

## & Recepto por fari bonajn versaĵojn:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 639 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, Lingvo Internacia, 1912). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi do; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi do;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TiLa Ti doTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o)

)×9 )+

### (&Strofoj:

'1 Vi do volus scii, kiamaniere ; oni lernas skribi versojn esperantajn? ; Kiel rimojn trovi, kiel belan senton, ; kiel lerni ĝuste uzi la akcenton ; por versaĵojn fari ĉarmajn, elegantajn?

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi.**)

'2 Nu mi al vi, kara, kun plezur' respondos ; kaj fidindan donos al vi eĉ recepton, ; kiamaniere kaj sen embaraso ; vi rapide lernos rajdi sur Pegaso ; kaj en redakcioj trovos bonakcepton. ....

'3 Vi unue devos studi la libreton ; pri la versfarado kaj pri la rimaro, ; kaj por ke vi agu ĝuste kaj laŭ plano ; vi aĉetos al vi veston el ŝaflano, ; por vin bone ŝirmi kontraŭ nazkataro. ....

'4 Vi ja scias certe, ke dum la printempo ; oni la plej ofte faras versojn ĉarmajn, ; ke printempe tiklas la plej multe plumo, ; sed ke nin minacas ankaŭ malvarmumo, ; tial mi eĉ ŝuojn rekomendas varmajn. ....

'5 Kiam la libreton vi trastudas, nune ; iru en naturon, eble en arbaron, ; se nur eble iru tien post krepusko ; kaj sidigu tie vin sur ŝton' aŭ musko ; kaj tralegu ree bone la rimaron. ....

'6 Vi ekvidos certe flugi la birdetojn ; kaj en musko ankaŭ kreski junan floron, ; ĉarman lekanteton, eble eĉ galanton, ; kaj de arboj aŭdos vi nun dolĉan kanton, ; kiu ĝojoplana faros vian koron. ....

'7 Bone eĉ memoru, ke sen sun' kaj steloj ; estas poezio preskaŭ nelegebla, ; sed samtempe skribi pri belega luno, ; pri brilantaj steloj kaj pri varma suno ; eĉ en Esperanto estas aĵ' ne ebla. ....

'8 Bone estas ankaŭ, se en la arbaro, ; kiun vi elserĉos, plendos najtingaloj ; kaj se rivereto plaŭdos en proksimo, ; tiam ne komponi estus vere krimo ; kontraŭ ĉiuj homoj, kontraŭ la ĵurnaloj. ....

'9 Sed plej bone estas, se vi kun knabino ; brak' ĉe brako ie en arbaro vagos; ĝi instigas ĉiam en plej alta grado ; al la poezio kaj al versfarado, ; kion la gazetoj al vi bone pagos. ....)